Protokolo de la kunveno de la Komitato de TEJO

Paŭlo Ebermann (ĝis 6.1, kaj formatado), Felix Zesch (de 6.2).
Sub respondeco de la Ĝenerala Sekretario Paulína Kožuchová.

IJK en Liberec', 2009-07-19 ĝis 2009-07-24

Enhavo

Sesio 0
Dimanĉo, 19a de Julio 2009 **2**

0. Prezento, interkonatiĝo . . . 2

Sesio 1
Lundo, 20a de Julio 2009 **2**

1. Bonvenigo kaj malfermo . . . 2
2. Sinprezentoj . . . 2
3. Elekto de la prezidanto de la Komitato . . . 2
4. Proponoj pri komisionoj . . . 2
   - 4.1 Voĉdona komisiono . . . 2
   - 4.2 Mandata komisiono . . . 2
   - 4.3 Kandidata Komisiono . . . 3
   - 4.4 Propona komisiono . . . 3

Laboro de la mandata komisiono . . . 3

5. Prezento kaj decido pri la Tagordo . . . 4
6. Aktuala Situacio ene de TEJO kaj UEA . . . 4
   - 6.1 Jarraporto 2008-2009 . . . 4
   - 6.2 Honora membreco . . . 5
   - 6.3 Elekto de nova komitatano A de TEJO ĉe UEA . . . 5
7. Raporto kaj demandoj pri Pasporta Servo . . . 6
8. Laboro en laborgrupoj . . . 7

Sesio 2
Merkredo, 22a de Julio 2009 **7**

9. Diskuto pri Kontakto . . . 7
10. IJK 2010 . . . 8
11. IJK 2011 . . . 9
12. Strategia celo: IJK en Afriko en 2012 . . . 9
13. Monda kursa mapo . . . 10
14. Elekto de nova Estraro de TEJO kaj komisiito . . . 11
15. Kongresa rezolucio . . . 12

Sesio 3
Vendredo, 24a de Julio 2009 **12**

16. Rezultoj de la laborgrupoj . . . 12

16.1 Aliĝpetoj de la benina kaj meksika Esperanto-junularoj, BOJE kaj MEJ....13
16.2 Reta Membreco....14
16.3 Kien iru TEJO.org?....15
17. Reta voĉdonado....15
18. E@I....15
19. Mezorienta komisiono....16
20. Provizora laborplano....17
21. Kongresa rezolucio....17
22. Elekto de la elekta komisiono....17
23. Komuna fotado....18
Aldonaĵoj **18**

Sesio 0
Dimanĉo, 19a de Julio 2009

0. Prezento, interkonatiĝo

Gregor malfermas la kunvenon. Estas kelkaj ludoj por interkonatiĝo kaj prezento de la landaj (kaj fakaj) sekcioj.

Sesio 1
Lundo, 20a de Julio 2009

1. Bonvenigo kaj malfermo

La Prezidanto, Gregor, bonvenigas la partoprenantojn al la unua sesio.

2. Sinprezentoj

La sinprezentoj jam okazis en la nula sesio, nun nur prezentas sin la kelkaj komitatanoj, kiuj mankis tiam.

3. Elekto de la prezidanto de la Komitato

Laŭ la Reglamento kutime la Prezidanto de TEJO ankaŭ estas prezidanto de la Komitato, kaj **la Komitato do elektas Gregor.**

4. Proponoj pri komisionoj

4.1 Voĉdona komisiono

Estas proponitaj Saŝa kaj Alekĉjo, kaj **la Komitato voĉdonas por ili.**

4.2 Mandata komisiono

Proponitaj estas Felix kaj Irmina – **la Komitato voĉdonas pore.**

4.3 Kandidata Komisiono

La Komitato elektas Rogener kaj Felix.

4.4 Propona komisiono

Post eta diskuto (kaj klarigo de la taskoj) deklaras sin preta Nico kaj Leandro, **la Komitato elektas ilin**.

Laboro de la mandata komisiono

La mandata komisiono konstatas la ĉeeston kaj voĉdonrajton de:

- Gregor Hinker kiel estrarano
- Felix Zesch kiel komitatano A por Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj anstataŭanto por Aŭstra Esperanto-Junularo (AEJ) (du voĉoj)
- Rogener Pavinski kiel estrarano
- Tom Juval kiel komitatano A por Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI)
- Nico Huurman kiel komitatano A por Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- Paulína Kožuchová kiel komitatano A por Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
- Marek Blahuš kiel komiatano A por Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
- Julia Hedoux kiel komitatano A por Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO)
- Andrei Dumitrescu kiel komitatano A por Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO)
- Julia Hell kiel komitatano A por Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- Irmina Szustak kiel komitatano B
- Petro Baláž kiel komitatano A por Esperanto@Interreto (E@I)
- Michael Boris Mandirola kiel komitatano A por Itala Esperantista Junularo (IEJ)
- Matthias Humet kiel komitatano A por Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA)
- Krishno Sivilla Rubio kiel anstataŭanto por Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
- Łukasz Żebrowski (LukiZ) kiel komitatano A por Pola Esperanto-Junularo (PEJ) kaj anstataŭanto por Kroatia Esperanto-Junulara Ascocio (KEJA)(du voĉoj)
- Leandro Souza Moreira kiel anstataŭanto por Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
- Joop Kiefte kiel komitatano A por Esperanto-Universala-Rok-Organizo, Kolektiva Komunik-Asocio (EUROKKA)
- Song Ho-young kiel komitatano A por Korea Esperanto-Junularo (KEJ) kaj anstataŭanto por Japana Esperanto-Junularo (JEJ) (du voĉoj)
- Oleksandra Kovyazina (Saŝa) kiel komitatano B
- Irina Gerasimova kiel komitatano A por Ukraina Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ)

Ni do havas 23 voĉojn, kio estas pli ol la kvorumo.

Ĉeestas krome sen voĉdonrajto:

- Alexandre Raymond (Alekĉjo)
- Paŭlo Ebermann (TEJO-volontulo)
- Ariadna García Gutiérrez kiel reprezentanto de Junulara Sekcio de Kuba Esperanto-

Asocio kaj ĉeforganizanto de IJK 2010

- José Gabriel Jiménez Rendón (reprezentanto de Meksika Esperanto-Junularo)
- Daniel Moreno Martinéz (reprezentanto de Meksika Esperanto-Federacio)

Ne ĉeestis dum tiu kontrolo, sed antaŭe aŭ poste dum la kunveno:

- Jonas Dalmose kiel anstataŭanto por Dana Esperantista Junulara Organizo (DEJO)
- Jordon Kalilich kiel anstataŭanto por Usona Esperantista Junularo (USEJ)

5. Prezento kaj decido pri la Tagordo

Gregor prezentas la tagordon. Post proponoj de diversaj komitatanoj la jenaj punktoj estas aldonitaj:

- „IJK 2011“ (inter „IJK 2010“ kaj „IJK 2012“)
- „Aktivula trejnado“ (post „laborplano“)
- „Diversaĵoj“ (antaŭ „Komuna foto“)

Kun tiuj ŝanĝoj **la tagordo estas akceptita.**

6. Aktuala Situacio ene de TEJO kaj UEA

6.1 Jarraporto 2008-2009

Rogener kaj Gregor, kiuj anstataŭas la ne-ĉeestantan Ĝeneralan Sekretarion Anna-Laŭra, prezentas la jarraporton (kaj ĉiu sian parton).

Administrado:

Nico atentigas pri necesa ŝanĝo de jaronumero 2007 al 2008 (en parto pri volontulo).

Membroj

Felix plendas, ke denove en la statistikoj ne estas grafeoj, sed nur „nombro-tombejo“.

Michael Boris demandas pri planoj por membrovarbado. Laŭ Gregor la aktuala stato ne estas terure malbone, do ne necesas pli da varbado ol kutime.

Financoj

La financa raporto de 2008 mankas ankoraŭ, kio jam iĝis tradicio. Ĝi venos poste.

Gregor mencias, ke sur nia ŝparkonto estas 19 000 €, kaj principe la financoj de TEJO estas en sana stato.

Pri la plano por financoficisto ni parolu poste.

La IJK 2008 faris etan profiton (ne grandan malprofiton, kiel estis onidiroj).

Landa Agado

Pri novaj landaj sekcioj estos decido poste.

La Komisiono pri landa agado estis revivigita – ĝi konsistas el la estrarano pri Landa agado kaj la komisiitoj pri Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko.

Felix proponas por sekva KODEJO uzi enketilon „limesurvey“ anstataŭ „google docs“.

Ho-young aldonas: En 2010 okazos 29a Komuna Seminario de VEJO (ekster la kutima Serio de Komunaj Seminarioj de KEJ, JEJ, ĈEJ).

Eksteraj rilatoj

Gregor: KER serĉas novajn aktivulojn, kiuj helpas plibonigi la laboron tiudirekte.

Aktivula trejnado

Saŝa demandas pri seminarioj. La subvencipetoj tiucele ne sukcesis, sed oni refaros ilin, kaj ili tiam espereble sukcesos.

Mankas mencio de tio ĉe tiu parto de la jarraporto (sed ja estas ĉe Financoj).

IJK

Felix: Mankas novula/komencanta programo dum IJK – estonte estu iu „checklist“ por IJK.

Centra Oficejo

Alvoko: Ni serĉas novan volontulon.

Informado

Felix aldonas, ke li kreis afiŝon por varbi pri TEJO.

Ĝenerale mankas respondoj en la komitata diskutlisto.

Felix alvokas uzi la filmon „Esperanto estas“ en retpaĝaroj de landaj sekcioj.

Kontakto

La revuo nun havas malfruon de duona jaro. Ekzistas plano por redukti tiun malfruon: Federico Faccio Pelaez (antaŭa TEJO-volontulo) kreos numerojn paralele al Paŭlo Moĵajev (la ĉefa redaktoro).

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, decidas akcepti la jarraporton de la Estraro (kun la proponitaj ŝanĝoj).
>
> 2 sindetenoj, 0 kontraŭvoĉoj. Akceptita.

6.2 Honora membreco

Gregor prezentas la atingojn de Derk, kiu dum 13 jaroj tutaŭtonome, memstare kaj sen ekstera helpo kompilis Pasportan Servon, investante multege da tempo. La Estraro tial proponos al la Komitato, ke Derk iĝu honora membro de TEJO.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, decidas doni honoran membrecon de TEJO al Derk Ederveen, pro lia longdaŭra kaj elstara laboro por Pasporta Servo.
>
> Akceptita.

6.3 Elekto de nova komitatano A de TEJO ĉe UEA

TEJO havas ĉe UEA du komitatanojn kaj tial estas relative bone reprezentita. Elektitaj estis Haris Subašić kaj Petro Baláž. Haris ekde sia elekto ne aktivis en tiu posteno kaj ne plu volas plenumi tiun postenon. Tial la Estraro serĉas novan reprezentanton kaj proponas Nico Huurman.

La Komitato de TEJO, kunveninta en la IJK 2009 en Liberec, komisias al la Estraro de TEJO, ke Nico HUURMAN estiĝu la nova komitatano A de TEJO ĉe UEA, kune kun Peter BALÁŽ.

Akceptita.

En la provizora versio de la jara raporto, Nico estas jam menciita kiel reprezentanto ĉe UEA.

7. Raporto kaj demandoj pri Pasporta Servo

Gregor prezentas la parton de la jarraporto pri Pasporta Servo. Sekvas demandoj.

Antaŭe PS havis deficiton. Kiel tio laŭ takso de la Prezidanto evoluos en la estonteco?

Ne plu estas enspezoj, ĉar ne estos vendataj libroj. Ne plu estas grandaj elspezoj, ĉar la libro ne aperas. Oni povu uzi la PS ankaŭ sen retaliro. Tial ni volas pludaurigi la eblecon PS-umi papere.

La mankantajn enspezojn eblus krei per reklamo en la retejo. Konkreta plano ankoraŭ ne ekzistas. La konstantaj kostoj estas malaltaj (por la servilo proksimume 10 USD) kaj la granda komenca investo estis grandparte kovrita helpe de subvencipetoj.

Ĉu okazos prezento de PS kadre de la IJK programo?

Vendrede en la TEJO vespero okazos la publika prezento. La programisto devas ankoraŭ fari kelkaj riparendaĵetojn.

Kiuj estas la antaŭvideblaj kondiĉoj de uzo de Pasporta Servo por la antaŭ enretigo enskribitaj gastigantoj?

La kondiĉoj por la nova sistemo estos tre malsamaj al la malnovaj. La nepra montrado de la libro ne plu estas postulata por gastigado, ĉar ĝi al junaj uzantoj ne plu ŝajnas logika. Praktike sufiĉas sistemo simila al la aliaj retaj gastigaj servoj.

Kiam aperos la papera eldono?

En la interreta sistemo ankoraŭ ne estas funkcio por krei libron. Ne ekzistas laborplano laŭ kiu eblus taksi kiam la papera versio aperos.

La eldonkvanto estas nedifinita. Oni pripensas laŭmendan presadon. Supozeble post kvar semajnoj aĉeteblos kajero.

Por la estonteco estas bezonata konstanta aro da partoprenantoj. La iamaj landaj kunordigantoj povas parte plenumi tiun taskon. Eblas disigi la taskon en teĥnikan, ĉefe gvidatan far Joop KIEFTE, kaj moderatoran, en kiu nun Julia NOE estas enlaborigita. Pliaj volontuloj estas bonvenaj.

Pluraj libroj de 2009 malaperis post la presado kaj ne alvenis ĉe TEJO. Kulpulo ne troveblis. En pasportaservo.org estas nun registritaj proksimume 450 membroj, kio estas malpli ol antaŭe, sed supozeble en la interreta epoko tiu nombro rapide pligrandiĝas. Krome rimarkindas, ke en la antaŭa papera versio eble estis homoj, kiuj ne aktive gastigis.

Je kiu adreso la servo estas atingebla?

La transdono de la domajno pasportaservo.net far E@I ankoraŭ ne estas finfarita pro procedaj malfacilaĵoj. Krome ĝi atingeblas je pasportaservo.org. La .net-adreso estu

emfaze privarbita pro la reta karaktero de la servo.

8. Laboro en laborgrupoj

Estas prezentataj la temoj de la laborgrupoj. Troviĝas gvidantoj kaj membroj por ĉiu laborgrupo. La laborgrupoj laboros inter la sesioj kaj komence de la tria sesio, kie ankaŭ estos la prezento de la rezultoj.

Sesio 2
Merkredo, 22a de Julio 2009

9. Diskuto pri Kontakto

La Situacio jam estis klarigita dum la prezentado de la jarraporto.

Michael Boris:

Indas havi socikulturan revuon. Eble oni povas instigi novulojn per konkurso kies premio estas senkosta partopreno en la IJK. Krome oni povus alvoki Esperanto-instruistojn sendi tekstojn de siaj lernantoj al Kontakto. Tiaj artikoloj ĉiukaze ofte estas skribataj kaj tiel povus ankoraŭ pluutili.

Saŝa:

La demando estas, kial mi skribu senpage? La ideo de premio por la plej bona artikolo ŝajnas bona. Kiel premioj eblus ekzemple senkosta partopreno en renkontiĝo aŭ monpremio.

Felix:

Deinterna motivigo estas multe pli bona ol deekstera motivigo. Ni ĉiuj eklernis Esperanton ne pro monaj interesoj.

Matthias:

Homoj, kiuj ne tiom bone parolas Esperanton, ne verkos artikolon, se ili kredas ĉiukaze ne venki en la konkurso. Kiam homoj verkas kontraŭ mono, tio iĝas laboro kaj ne plezuro.

Irmina:

La problemo estas eble ankaŭ flanke de la redaktoro, kiu ne sufiĉe aktive varbas por artikoloj. Ekzemple pli aktive varbi en la naciaj listoj.

Michael Boris:

Instigo per senkosta partopreno estas pli taŭga ol monpremio.

Gregor:

Ni povus ankaŭ doni premion el la libroservo de UEA. Eblus doni premiojn en diversaj kategorioj.

Felix:

Ankaŭ eblas lotumi premiojn por eviti la kreadon de pritaksa komisiono kaj sistemo, kio kaŭzus senutiletan laboron.

Matthias subtenas tiun ideon.

Saŝa:

Mi preferas legantaran voĉdonon al lotumado.

Paŭlinka:

Oni povus instigi la legantojn al voĉdonado per lotuma premio.

Felix:

Konsiderindas la kunmetado de la gazetoj TEJO-tutmonde kaj Kontakto.

Gregor:

La origino de la du apartaj eldonaĵoj estas la raŭmismo. Kontakto havas multajn abonantojn ekstere de la TEJO-membraro.

Saŝa:

Estas du diversaj konceptoj de TT kaj Kontakto, mi neniam abonus sole TT.

Michael Boris:

Se ni kunigus TT kaj Kontakton, laŭ sperto en Italujo, ni riskas, ke iam aperas nur movadaj artikoloj.

Nico:

Monato estas pli altkvalita ol Kontakto, tamen ankaŭ Monato havas grandajn problemojn.

Saŝa:

Konsiderindas forlasi la koncepton de unuĉeftema revuo favore al diverstema, ĝenerala revuo kun ĉeftemo.

Alekĉjo:

Ambaŭ versiojn eblas kunigi. Se venas multaj artikoloj, ni povas simple publikigi ilin.

Paŭlinka:

Ankaŭ por la legantoj estas ĉiam pli interese legi pri diversspecaj temoj.

Saŝa:

La ŝanĝo de la koncepto povas jam malnecesigi la premisistemon.

Joop:

Ni povas nomumi komisiitojn por prizorgi la rubrikojn.

Michael Boris:

Necesas klare reliefigi la rubrikojn por montri, ke estas nova koncepto.

Resumo: Ni ne kontraŭas, ke estas ĉefa temo, sed ni pliriĉigu la gazeton per diverstemaj kontribuoj por igi la gazeton pli interesa por diversspecaj legantoj. La ĉefredaktoro serĉu kontribuantojn por la unuopaj rubrikoj aperigotaj.

10. IJK 2010

(Post la unua sesio okazis publika programero pri la sekva IJK.)

Irmina:

Pri la financa parto ni ne parolis publike. Ĉu facile eblus akiri subvenciojn en via lando?

Ariadna:

Supozeble ne, sed ni ankoraŭ ne komencis serĉi. Ni esploros tiun eblecon.

Marek:

Eble indas ligi ĝin al la UK, kiu ja ricevas subvencion de la registaro.

Ariadna:

Ne ekzistas klareco pri la detaloj de la subvencio. Same pri la temo de la renkontiĝo ankoraŭ ne ekzistas klareco.

Gregor:

Ni komune en la komitata listo diskutu eblajn temojn por helpi en la LKK. Tiucele Ariadna aniĝos en la komitata listo.

11. IJK 2011

La alvoko kandidatiĝi por IJK 2011 aperos plej malfrue en oktobro, laŭ plano de LukiZ jam en aŭgusto. Ĝis nun ne estas proponoj. La UK laŭdire estos en Madrid, sed pli da certeco estos nur post la UK sekvontsemajne. *[Fakte oni decidis por Kopenhago – rimarko de la protokolanto poste.]*

12. Strategia celo: IJK en Afriko en 2012

Irmina prezentas estraran proponon pri la organizado de IJK en Afriko (komparu dokumenton en la apendico). La propono celas subsaharan Afrikon, ne nordan Afrikon. La celo estas enretigo de la afrika movao en la tutmondan esperantistan reton.

Gregor:

Tiu ideo naskiĝis antaŭ duonjaro. La fono estas la opinio, ke IJK en Afriko ne realiĝas same facile kiel IJK en aliaj landoj. La kondiĉoj estas multe malpli facilaj ol en aliaj landoj kaj neekzistantaj en aliaj kandidatiĝantaj landoj. Tial Afriko bezonas specialan subtenon. Por tia eksterordinara IJK do necesas eksterordinaraj paŝoj.

Tom:

Ĉu UEA havas similajn alstrebojn?

Gregor:

Ne. Ĝis nun okazis nur unu konferenco de ILEI en Afriko. Miascie ĉiuj subtenstrategioj celas subtenon de individuaj membroj. UK en Afriko ne estas horizonta celo de UEA.

Vladťka Chvátalová prezentas sin. Ŝi estis dum du jaroj ĜenSek de TEJO kaj nun engaĝiĝas kadre de ILEI. Ŝi partoprenis la ILEI-konferencon en Benino. Tie kaj en Togolando estas tre grandaj membraroj. Estas multaj parolantoj kiuj loĝas en iuj perditaj vilaĝoj. Ili tamen parolas tre bone Esperanton sed malofte povas apliki ĝin. Ili eĉ ne havas monon por vojaĝi ene de Afriko. ILEI kaj UEA tial devis finance helpi. En Afriko, la movado estas multe pli juna ol en Eŭropo, same en Kubo. Por IJK oni havus do multajn homojn, kiuj interesiĝus. Tamen ili ne havus monon por la restado eĉ se ili devus nur vojaĝi en sia lando. Infrastrukturo estas granda problemo. Kongresaj palacoj kaj bonaj hoteloj malabundas.

La propono de la komisiono estas prezentota al kaj voĉdonota far la Komitato antaŭ efektivigo.

La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, deklaras ke afrika IJK estas strategia celo de TEJO, por subteno de la afrika movado, la alproksimigo de movaderoj kaj individuoj, la simbola valoro en kaj ester la movado.

La Komitato taskigas la Estraron tiucele starigi komisionon, en kiu membros

- Junaj aktivuloj k spertaj gvidantoj el Afriko
- Eksterafrikaj spertuloj pri Afriko
- TEJO-estrarano(j) pri IJK kaj/aŭ landa agado
- specialisto pri financado/subvenciakirado

Tiu komisiono laboru laŭ plurnivela procedo:

a) Sondado pri eventualaj kongreslandoj kaj lokoj, konsiderante ĉiujn necesajn aspektojn
b) Instigi preparajn aktivecojn: aktivulan trejnadon k.s.
c) Sondi pri monfontoj subtenaj al la projekto
d) Starigo de internacia teamo
e) prezenti proponon.

La propono de la komisiono estos prezentota al kaj voĉodonota de la Komitato antaŭ efektivigo.

Jes: 19. Akceptita.

13. Monda kursa mapo

Felix prezentas sian proponon sciigitan al la Komitato antaŭ la kunsido retpoŝte. Sekvas komento kaj diskuto:

LukiZ:

La mapo povus montri ne nur kursojn, sed ankaŭ klubajn eventojn kaj grandajn eventojn.

Michael Boris:

Necesas ne nur krei la teĥnikan, sed ankaŭ la organizan infrastrukturon por la projekto.

Marek:

Ĉu vere troveblos volontulo por tiom granda tasko? Eble indus trovi buĝeton por tio.

Joop:

Ĉu eblas adapti „mondan kalendaron“ por tiu ĉi celo?

Michael Boris:

Nepre ne montru la nombrojn de kursanoj en la mapo.

Gregor:

Pro la jama laboro de pasportaservo.net, monda kalendaro kaj esperantoland.org la programista laboro verŝajne ne estos tre granda.

Peter:

Katalin Smidéliusz-Kováts estis taskigita de ILEI kolekti informojn pri kursoj. Ŝi havas do nuntempe la plej aktualajn datumojn. Indas kunlabori kun ŝi.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, rekonas bezonon de monda mapo de kursoj, kaj ke TEJO estas taŭga organo por tion realigi kunlabore kun LS-oj kaj taskigas al la Estraro kaj al la komisiitoj realigi la planon priskribitan de Felix pri kursmapo, eventuale uzante bezonatan monsumon.
>
> Akceptita.

14. Elekto de nova Estraro de TEJO kaj komisiito

Felix prezentas la rezultojn de la elekta komisiono.

Gregor klarigas la regulojn de sekreta voĉdonado: Unue necesas decidi la maksimuman nombron de postenoj, poste elekti la homojn por tiuj postenoj.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, decidas, ke por la periodo 2009–2011 la Estraro konsistu el maksimume ses personoj, kaj ke ĝi havu maksimume tri vicprezidantojn.
>
> Akceptita.

La voĉdona komisiono disdonas voĉdonilojn, kaj poste kolektas ilin denove.

Post kalkulado aperos la sekva rezulto.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, elektas jenan novan Estraron:
>
Ofico	Nomo	voĉoj por estrarano	voĉoj por ofico	elektita
Prezidanto	Gregor Hinker	21	20	jes
Vicprezidanto	Łukasz Żebrowski	22	18	jes
	Irmina Szustak	22	18	jes
	Oleksandra Kovyazina	22	18	jes
Ĝenerala Sekretario	Paulína Kožuchová	22	19	jes
Kasisto	Sergeo Tyrin	22	19	jes
>
> Entute estis 24 voĉoj, kun du malplenaj voĉdoniloj.
>
> Ĉiuj kandidatoj estas elektitaj al la postenoj, por kiuj ili kandidatiĝis.

Marek anoncas sin kiel kandidato por la posteno de komisiito por Reta Agado – tion li jam antaŭe skribis al la Elekta Komisiono, sed tiu informo ne ĝustatempe antaŭe atingis la Komitaton. Joop reage al tiu retiras sian kandidatiĝon por la sama posteno kaj intencas subordone kunlabori en la komisiono.

Al la alvoko de la Elekta Komisiono pretiĝi esti komisiito por Aktivula Trejnado, neniu reagis.

Ankaŭ nun okazas sekreta voĉdono.

La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, elektas por la posteno de Komisiito por Reta Agado:

	Voĉoj	elektita
Marek Blahuš	20	jes

Du voĉdoniloj estis malplenaj, unu nevalida.

Elektita estas Marek Blahuš.

15. Kongresa rezolucio

Gregor prezentas la ideon de kongresa rezolucio. Ĝi povus enhavi reagon al la eldiroj de Václav Klaus, ĉeĥa prezidanto, kiu en 2008 asertis, ke Eŭropaneco estas same morta kiel Esperanto.

Aldone, la rezolucion povus subskribi la komitatanoj kaj sendi ĝin al Václav Klaus. Tio ankaŭ uzeblas en publika agado kun gazetoj (frapfrazoj kiel „tricent mortaj homoj subskribis deklaron por Esperanto“).

Laborgrupo por verki ĝin laboros ĝis la tria sesio.

Sesio 3
Vendredo, 24a de Julio 2009

La trian tagon ĉeestas 19 voĉoj.

16. Rezultoj de la laborgrupoj

La laborgrupoj prezentas siajn rezultojn, kaj sekvas po diskuto pri tio.

16.1 Aliĝpetoj de la benina kaj meksika Esperanto-junularoj, BOJE kaj MEJ

Gvidanto	Rogener
Partoprenantoj	Julia Hell, Irmina, Paulínka
Situacio	BOJE kaj MEJ volas iĝi landaj sekcioj de TEJO
Atingitaj rezultoj	Ĝenerale la statuto de BOJE estas bona, sed necesas kelkaj etaj ŝanĝoj por igi ĝin akceptebla: • Necesas pli emfazi la demokratian funkciadon de la organizo – nun ĝi prezentiĝas iom tro aŭtoritate, ekzemple en 2.6 pri malmembrigo (teorie la estraro povus malmembrigi la tutan asembleon, kaj tiel eviti sukcesan apelacion pri la malmembrigo). • Indas ankoraŭfoje rigadi la devojn de la membroj en la reglamento – ni sugestas rezigini pri la punkto 1.2d. La statuo de MEJ ankoraŭ ne estis kompleta por esti akceptita. Ni sugestas pli detale priskribi la punktojn pri: • membrokunveno (pri kvorumo, maniero de voĉdonado, taskoj de la membrokunveno) • junulara konsilo (ekzemple ĝiaj taskoj, ĝia elektmaniero, la distingo inter prezidanto, kasisto ktp.) • ĝeneralaj rajtoj de la membroj • financa mastrumado La reprezentantoj de Meksiko dankas pro la komentoj kaj konsiloj kaj komprenas la neceson de ŝanĝoj.
Pluaj paŝoj	Post la prilaboro de la statuto la Komitato povas rete voĉdoni pri la aliĝo.

Nico: Eble indas preni la statuton de JEBUO kiel helpo.

La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, kore bonvenigas la strebojn de BOJE kaj MEJ fariĝi Landaj Sekcioj de TEJO. Ĝi komisias al la koncerna estrarano en kunlaboro plibonigi la statutojn de tiuj asocioj kaj kiam ili pretas doni ilin al la Komitato por reta aŭ fizika voĉdono.

Jes: 19, Ne: 0, Sindeteno: 1. Akceptita.

16.2 Reta Membreco

Gvidanto	Nico
Partoprenantoj	Gregor, LukiZ, Tom, Ho-young, Julia Hedoux, Andrei, Leandro, Alekĉjo, Michael Boris
Situacio	La Komitato de UEA volas oferti favorprezan retan membrecon por membroj sub 30 jaroj. La Estraro de UEA dum la venonta kunveno volas voĉdoni pri membreco kiun karakterizas • Membrokotizoj de malmultaj eŭroj • Nericevo de gazetoj kaj publikaĵoj La rezulto de la laborgrupo estos reprezentita en la komitat-kunveno de UEA en la UK kaj forte influos la decidon.
Atingitaj rezultoj	Bela teksto kiel rezolucio de la Komitato, vidu en la aldonaĵo.
Pluaj paŝoj	La starpunkto estos prezentita en la Komitato de UEA kiel starpunkto de TEJO.

Felix:
La kategoriaro de UEA jam nun estas malklara. Oni prefere rekreu la tutan kategori–sistemon kaj plifaciligu ĝin.

LukiZ:
Laŭ spertoj en PEJ homoj ne aliĝas kontraŭ malgrandega prezo, se ili ne vidas avantaĝon. Ili simple tro pigras.

Gregor:
2 EUR ne kovras eĉ la administradokostojn en la CO. Tie nun estas tre granda kvanto de mana laboro ankoraŭ.

Tom:
Indas plibonigi la sistemon de membroadministrado en la CO.

Peter:
Ĉu vere UEA volas enkonduki la retan membrecon nur por <30-jaruloj?

Gregor:
Jes, sed tio ĝis nun ne estas skribe fiksita.

Saŝa:
Eble indas enkonduki senkostan kategorion por nombri Esperantistojn.

Gregor:
La problemo estas, ke kelkaj ne volas aliĝi al UEA.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum IJK 2009 en Liberec, akceptas la decidoproponon de la laborgrupo.
>
> Jes: 15, Ne: 1, Sindeteno: 2. Akceptita.

16.3 Kien iru TEJO.org?

Gvidanto	Felix
Partoprenantoj	Krishna, Mathias, Joop, Saŝa, Irina
Situacio	Kiel aspektu la retaj servoj de tejo.org?
Atingitaj rezultoj	Mensa mapo en la apendico

Petro:

Mi proponas, ke TEJO ŝovu la paĝaron al propra servilo. Drupal ne estas tre sekura.

Marek:

Mi ne estas tre favora al Drupal, sed pretas lerni pri ĝi, se ĝi jam ekzistas. Se E@I ne volas Drupalon sur la servilo tiam TEJO devas translokiĝi.

Jonas:

Ĉu eblas havi funkcion por kontroli, ĉu oni jam pagis sian kotizon?

Gregor:

La reta jarlibro disponigas similan servon kaj ni povas pripensi integrigi ĝin.

17. Reta voĉdonado

Pro la nereago de kelkaj komitatanoj ne eblis rete voĉdoni pri la ekuzo de la reta voĉdonsistemo. Tial nun necesas komitatkunside decidi pri ties ekuzo.

> La Komitato fiksas, ke por la efektivigo de retaj voĉdonoj estos uzata la jam ekzistanta teĥnika sistemo.
>
> Jes: 18, Ne: 0, Sindeteno: 2. Akceptita.

18. E@I

Peter Baláž prezentas la vidpunkton de E@I: E@I havas memstaran librotenadon, buĝeton kaj Estraron kaj en la pasinteco tre kreskis. Ĝi tial ne plu volas esti suborganizo de TEJO kaj UEA kaj strebas al sendependenco ne estante rekte rilata kiel fakasocio.

Gregor:

La fakaj sekcioj povas diri al TEJO kion fari, sed ne inverse. TEJO estas tegmenta organizo, tenata per la apogiloj de fakasocioj kaj membroj.

Tom:

Ankaŭ LSoj havas propran Estraron, librotenadon kaj buĝeton. Kio estas la diferenco?

Peter:

Origine la E@I-estraranoj estis ankaŭ TEJO-estraranoj. Poste sekvis organiza ŝanĝo. Ekde 2005 ne plu havis grandan sencon esti fakasocio. E@I faras pli ol TEJO kaj estas stulte esti subasocio de tegmenta asocio kiu faras malpli.

Tom:

Kiel E@I profitas de sendependeco?

Peter:

Ni povas pli bone trakti subvencipetojn. Antaŭe nia agado estis prezentita kiel laboro de TEJO kaj TEJO por tio ricevis subvenciojn.

Gregor:

Kutime la ĉefa objekto de subvencipetoj estas lernu.net. Tiu retejo estis starigita kiam E@I estis parto de TEJO. El nia vidpunkto lernu.net kreskis kaj estis financata per la rimedoj de TEJO. Inter tiuj rimedoj estis seminarioj de TEJO, sed ne perrekte mone.

Peter:

Finance lernu.net estas pure propraĵo de ESF. Enhave ĝi estas posedaĵo de E@I kiel la lernu!-teamo. Ni ne vidas utilon esti fakasocio de TEJO. Sed mi ne kontraŭas la partnerecan kunlaboron.

Gregor:

El mia vidpunkto ĉio redukteblas al du demandoj:

a) La disputo pri tio al kiu apartenas lernu.net. Tiu demando estas solvebla certe kaj fakte eble eĉ ne tiom gravas por subvencipetoj, se oni referenciĝas en ĝi al certa tempoperiodo por lernu.net.
b) La atmosfera demando pri la *bebo, kiu volas foriri de la gepatroj*. Tio ne estas sufiĉa kaŭzo por la malfaksekciiĝo de E@I.

Tamen la Komitato por tio nenion devas decidi. Mi havas la impreson, ke temas ĉefe pri simbola paŝo, kiun mi en tiu konkreta kazo taksus neracia. Mi atendas oficialan deklaron de E@I al la Ĝenerala Sekretario.

19. Mezorienta komisiono

Ho-young proponas diskuton pri Mezorienta Komisiono. Estis pluraj kontaktoj kun orientaziaj landoj far de la komisiito pri landa agado en Azio sed mankis kontaktoj kun mezorientaj landoj, ĉefe ĉar komisiito ne estas lokano kaj tute ne konas la kondiĉojn.

Tom:

Jam okazis kontaktoj kun Israelo kaj verŝajne neniu neiranano povas havi pli bonajn kontaktojn al Irano ol vi jam havas.

Ho-young:

Kostas nenion elekti novan komisionon.

Michael Boris:

Ĉu oni konsideras nordan Afrikon parton de la regiono „Mezoriento“?

Tom:

En UEA ekzistas komisiono pri Mezoriento kaj norda Afriko. Mi membras en tiu komisiono. Ĝia ĉefa agado estas sendado de lernolibroj.

> La Komitato taskigas al la Estraro nomumi komisiiton pri Mezoriento kaj norda Afriko.
>
> Jes: 18 Ne: 0 Sindeteno: 2

20. Provizora laborplano

La tempo ne sufiĉis por detale verki skriban laborplanon, ĉar multaj estraranoj estas ankaŭ LKK-anoj kaj tial surloke aktivaj. La novaj estraranoj prezentas kelkajn ideojn:

Afrika IJK: Jam priparolita en la kunveno.

Renovigo de retejo kaj reta prezentado de TEJO: (Saŝa) TEJO ricevu retrokuplon de la membroj pri tio kion pensas homoj pri TEJO.

Pluevoluigo de KODEJO: (Irmina) Mi volas, ke la datumoj, kiujn kolektis Rogener, estu daŭre aktualigataj.

Instalo de konstanta komisiono pri la IJK: (LukiZ) Dum organizado estas revenantaj taskoj, kiujn eblas kopii. Laŭ nuna stato ĉiuj LKKoj lernas ilin denove. La ideo do estas krei komisionon, kiu laboras konstante kun la LKKoj por liveri tiajn aferojn. Tio malŝarĝas la LKKon de tiuj taskoj kaj al TEJO ebligas pli bone plani, kien iras IJK. Krome estas planita verki manlibron „kiel organizi IJKon“.

21. Kongresa rezolucio

Michael Boris laŭtlegas la rezulton de la laborgrupo. Ĝi trovas grandan aplaŭdon en la Komitato.

Gregor:

La rezolucio estas reago al malfavora rimarko de Václav Klaus: „Eŭropismo estas same kiel Esperanto artefarita kaj morta.“ La rezolucio estas ekvilibra: ĝi reagas al la konkreta situacio, sed samtempe taŭgas por prezento al ĝenerala aŭskultantaro.

Michael Boris:

Nacia identeco estas eble indentigilo sed ne la ununura kaj ne pli aŭ malpli valora.

Marek:

Post aprobo, la rezolucio estos tradukita kaj sendita lunde al Václav Klaus kaj al ĉehaj amaskomunikiloj. Krome la rezolucio estos tradukita al aliaj lingvoj prefere jam en tiu nokto.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, akceptas la proponitan rezolucion kiel la *Rezolucion de Liberec'*.
>
> Jes: 15 Ne: 0 Sindeteno: 4. Akceptita.

22. Elekto de la elekta komisiono

Post ĉiu elekto de nova Estraro necesas elekto de nova Elekta Komisiono.

Paulina kaj LukiZ proponas Carsten Mischke, Felix Zesch kaj Rogener Pavinski.

> La Komitato de TEJO, kunveninta dum la IJK 2009 en Liberec, elektas Carsten Mischke, Felix Zesch kaj Rogener Pavinski en la Elektan Komisionon por la oficperiodo 2009–2011.
>
> Jes: 16 Ne: Sindeteno: 3

Carsten kaj Felix akceptas tuj la elekton. Rogener devas ankoraŭ jesi por efektivigi la elekton. (Li akceptis ĝin post la kunveno ankoraŭ dum IJK.)

Gregor dankas elkore al la eloficiiĝintaj estraranoj Anna-Laura, Rogener kaj Vildana.

23. Komuna fotado

Gregor oficiale fermas la kunvenon. La komitatanoj iras eksteren por komuna fotado.

Aldonaĵoj

- Rezultoj de la laborgrupoj:
  - Mensomapo pri la retejo
  - decidoproponono pri reta membreco
- Estrara propono pri IJK en Afriko
- Propono de Felix pri la kursa mapo
- Kongresa rezolucio